

Eŭropa Bulteno

Junio 2018, Numero 182

NEDERLANDAJ LINGVOJ



Nederlando estas plurlingva lando. Krom la nederlanda la oficialan statuson havas ankaŭ la *frisa* lingvo kaj du parolaj idiomoj estas rekonitaj kiel eŭropaj regionaj lingvoj: la *limburga* kaj la *nedersaksa*. Oficialan rekonon kiel minoritata lingvo ĝuas ankaŭ la *romaa* lingvo, kvankam la minoritato mem oficiale ne estas rekonita. Romaoj kaj Sintioj tamen loĝas en Nederlando jam de kvincent jaroj kaj estas sendube aŭtentike nederlanda lingvogrupo. Tiu ĉi lingvo estas ĉefe parola idiomo sed ekzistas ankaŭ poetoj en la romaa

kaj romaoj kaj sintioj kiuj verkas etnan poezion kaj prozon en la nederlanda. Alia etna lingvo, la *jida* jam malaperis sed ne sen spuroj: ĝi grave influis la nederlandan lingvon, precipe ties amsterdaman dialekton. Kelko da romaaj vortoj jam delonge ankaŭ nestas en la nederlanda. Krom tiuj ĉi lingvoj kun diversaj oficialaj statusoj, en Nederlando hejmas pluraj aliaj lingvoj kaj dialektoj. La parolantoj de la *zelanda* idiomo/dialekto aspiris akiron de sama statuso kian jam havas la *limburga* kaj la *nedersaksa*, sed tio ne estis oficiale aprobita. Kompreneble, la lingvo tamen ekzistas, eĉ se eblas diskuti pri la temo ĉu temas pri lingvo aŭ “nura” dialekto, samkiel kiam temas pri la *limburga* kaj *nedersaksa*. Tiuj ĉi idiomoj parolatas laŭlonge de la nederlanda-germana landlimo kaj plurloke ne eblas diri ĉu iu dialekto apartenas al unu aŭ la alia lingvosistemo. Iusence oni do povas diri ke oni parolas la nederlandan ankaŭ en Germanio aŭ inverse, germanajn dialektojn en Nederlando. Temas pri bergaj, neder-rajnaj, ripuaraj kaj diversaj platdiĉaj dialektoj. La *nedersaksa* kaj *platdiĉa* estas esence unu lingvo. Ĉiuflanke de la landlimo gravan influon sur la dialektojn havas la respektivaj naciaj lingvoj pro kio ili nuntempe ja malsamas en tiu senco ke pli taŭgas paroli pri *neder-saksaj* kaj *german-saksaj* dialektoj. Tiuj idiomoj, parolataj en nordorienta Nederlando kaj tuta norda Germanio ne evoluigis apartan formon de skribita normlingvo, kvankam ja oni verkas kaj literaturas en ties dialektoj. La normnederlanda baziĝas je frankaj dialektoj de provincoj Norda kaj Suda Hollando, Utrehto kaj okcidenta parto de Gelderland en Nederlando kaj Brabanto en Nederlando kaj Belgio. En Belgio oni grandparte transprenas la lingvon de Nederlando sed ja kun certa Brabanta koloro kaj respekto por lokaj karakterizoj kaj lingvaj tradicioj.

Krom la origine “nederlandaj” idiomoj en la Reĝlando Nederlando oficialan statuson havas ankaŭ la *papiamenta* kaj la *angla*. La papiamenta estas unu el la t.n. kreolaj lingvoj, kies leksika bazo estas portugal-hispana, sed la strukturo atestas pri la afrika origino de ĝiaj parolantoj kaj montras influojn de okcidentafrikaj lingvoj. Tiun lingvon oni parolas en la t.n. “subaventaj insuloj” aŭ ABC-insuloj (Aruba, Curaçao kaj Bonaire). En ĉiu el la tri insuloj la lingvo havas propran varianton de sia nomo (Curaçao: *papiamentu*; Aruba: *papiamento*; Bonaire: *papiamen* / nederlande *papiaments*), kaj ankaŭ ekzistas du variantoj de la normlingvo, respektive ortografio (Arubanoj preferas la etimologian dum en Curaçao oni uzas fonemike bazitan ortografion). En la ceteraj tri nederlandantiliaj insuloj – St. Maarten, St. Eustatius kaj Saba – oni parolas specon de angleska kreolo, kaj la angla estas la oficiala lingvo tie, apud la nederlanda, la lingvo de la registaraj instancoj. Do, sume, Reĝlando Nederlando havas kvar oficialajn lingvojn - nederlanda, frisa, papiamenta, angla - kaj tri rekonitajn etnajn/regionajn lingvojn romaa, limburga kaj nedersaksa. La lastaj tri lingvoj estas primare parolaj idiomoj sed ili ja posedas ankaŭ interesan literaturon, sed ne la unikan lingvonormon. La plej vigle vivanta kaj publike vaste uzata estas la limburga. Oficialan statuton havas ankaŭ la nederlanda gestolingvo.

La frisa lingvo, ja estas kompleta en tiu senco, kiel skriba kaj parola lingvo de Nederlanda provinco Frislando. Pli ol 80% de frislandanoj parolas la lingvon kaj pli ol 90% komprenas ĝin. Bedaŭrinde, nur 30-o da procentoj povas la lingvon ankaŭ skribi kaj eĉ malpli da frisoj ja faras tion. Do, ankaŭ la frisa estas grandparte parola idiomo kiu ne plene kovras ĉiujn kampojn de publika vivo. Sed frisoj estas fortika specio kun granda amo al sia lingvo. Tamen ankaŭ Frislando, eĉ se malgranda lando kun ĉ. 400.000 loĝantoj, ne estas unulingva. Esence temas pri du frisaj lingvoj: la “vera” frisa kaj la t.n. *urbfrisa* (*Stadsfries*). La urbfrisa estas fakte miksitaj lingvo hollanda-frisa, kiu ekestis en la plej grandaj urboj de Frislando kiel rezulto de kontakto inter la (nord)hollanda kaj la frisa. Tamen la urbfrisa estas malsama miksitaj lingvo ol la samnoma *okcidentfrisa hollanda dialekto* (*Westfries*) parolata en Norda Hollando, kiu estas klare nordhollanda sed kun certa frisa subtavolo. Simila miksitaj lingvo estas la dialekto de komunumo Bilt en Frislando, idiomo de hollandaj migrantoj en tute frisa ĉirkaŭaĵo. La ingrediencoj estas ĉiam la samaj sed la recepto ja alia, fakte inversa ol ĉe la urbfrisa! En sudorienta Frislando parolatas la *stelingverfa* dialekto de la nedersaksa, ja ankaŭ mikslingvo iusence, sed ĉi-foje temas pri la kombino neder-saksa kaj frisa. Similan recepton, sed kun alia rezulto, ni renkontas en la plej nordokcidenta angulo de Germanio, Orienta Frislando, kie parolatas la *orientfrisa*, esence platdiĉa idiomo (nedersaksa, germania malaltsaksa) forte influita de la jam formortinta orientafrisa dialekto. Krom la orientfrisa (la nederlandan frisan oni ofte nomas *okcidentfrisa*) ekzistas ankaŭ la *nordfrisa*, parolata sur germaniaj insuloj de la Norda Maro (*Inselfries*) kaj la apuda marbordo de Slezvigio-Holstejno (*Festlandfries*). La tri frisaj idiomoj tiom diferencas inter si ke oni povus paroli pri tri frisaj lingvoj, aŭ eĉ pli da, se konsideri ke la insulaj dielektoj estas pluraj kaj tre malsamaj. Tamen la okcidenta frisa (do tiu en Nederlando) estas la plej vivipova kaj la plej parolantoza.

Apud tiuj ĉi lingvoj kun certaj oficialaj statusoj en Nederlando parolatas multaj aliaj lingvoj. Sur la stratoj de nederlandaj urboj oni povas aŭdi diversajn surinamajn lingvojn, ni ne forgesu ke Surinamo estis nederlanda kolonio, same kiel Indonezio. El la surinamaj lingvoj la plej konata estas “*sranan*” aŭ *sranan-tongo*, angle-afrike bazita kreola lingvo kiu estas lingvo de pluraj kreolaj surinamanoj sed ankaŭ komuna lingvo de plimulto de ceteraj Surinamanoj kiuj parolas *sarnami* (parte kreoligita hindustana/urdua dialekto), la javan aŭ iun el la ĉinaj lingvoj/dialektoj: *hakka*, *mina*, *kantona* k.s. Kompreneble la surinamaj kaj nederlandaj ĉinoj kaj hindustanoj (hinduoj kaj islamanoj) uzas ankaŭ la normlingvojn de siaj nacioj, la *ĉinan*, *hindan* kaj *urduan*. Aliaj surinamanoj uzas la *javan* aŭ iun alian indonezian lingvon respektive

iun el la pluraj surinamaj indianaj aŭ aliaj kreolaj lingvoj (ekz. la *saramakanan*). Sed ja ĉiuj surinamanoj parolas perfekte la nederlandan, kvankam ofte kun aparta akĉento, ĝenerale ŝatata en Nederlando. Krom la surinamanoj grava etna kaj lingva grupo estas indonezianoj kaj papuanoj, inter kiuj la plimulto parolas la *indonezian* (ni diru, *malajan*) lingvon, kiel ekz. la Molukanoj.

Fine, ni ne forgesu la lingvojn de ekonomiaj migrantoj kaj azilantoj, kiuj dum lastaj kvardek jaroj trovis sian hejmon en Nederlando. Ilia listo estas tre granda: estus pli facile diri kiujn lingvojn oni *ne* parolas en Nederlando! En Rotterdamo mem oni parolas ĉ. 200 diversajn lingvojn! Ni menciuj nur la plej gravajn kaj unu el ili estas la *araba* (precipe ties *magreba dialekto*) kaj diversaj *berberaj lingvoj*, inter kiuj elstaras la *tamazihta*. Tiun lingvon parolas la plej multaj el nederlandaj 300.000 marokanoj.

Gravas menciuj ankaŭ la turkan, lingvon de preskaŭ 300.000 nederlandanoj. Simila cifero validas ankaŭ por surinamanoj kaj araboj, se ne estas certe kiom da ili parolas kiun el la lingvoj. Cetere, inter la “turkoj” estas granda kvanto de *kurdoj*, malfacile diri kiom da, sed verŝajne pli ol 50.000.

Inter aliaj migrantaj lingvoj ni menciuj nur provizoran liston de la plej gravaj: *portugala* (inkluzive de portugala kreola lingvo de multaj kabverdanoj, eble ĉ. 100.000), *hispana*, *itala*, *greka*, la t.n. *serbo-kroata* en diversaj variantoj siaj: bosna, kroata, montenegra, serba. Kompreneble ne mankas parolantoj de la albana, makedona, armena, kartvela kaj aliaj kaŭkazaj lingvoj; kaj tiel plu, kaj tiel plu. Lastatempe pli kaj pli ofte oni renkontas ankaŭ la *persan*, *urduan* kaj aliajn pakistanajn lingvojn, iujn afganajn lingvojn kiel la *puŝtua* aŭ *daria* k.s. Multnombros ankaŭ la parolantoj de tute recentaj novalvenintoj: poloj, rusoj, rumanoj, bulgarioj...Krome vi povos rimarki en Rotterdamo diversajn preĝejojn skandinavajn: danan, svedan, finnan kaj norvegan. Ankaŭ tiuj skandinavoj estas roterdamanoj kontribuantoj al la lingva bunto de Nederlando. Ni ne preterlasu menciuj multajn germanojn: kun pli ol 400.000 da membroj germanoj estas fakte la plej granda grupo de eksterlandanoj en Nederlando. La parolantojn de la angla ni tute ne devas menciuj. Tiun lingvon en Nederlando parolas praktike ĉiuj. Oni efektive uzas ĝin kiel helplingvon en multaj situacioj. Lando kiu vivas de komerco kaj sia trafiko pozicio ne povas vivi sen la angla. Lastatempe en la grandaj urboj, sed ankaŭ aliloke, venas tre grandaj nombroj da EU-iaj “ekspatoj”, do civitanoj de EU sed ankaŭ de aliaj landoj (Kanado, Usono, Brazilo ktp, ktp.), kutime pli alte edukitaj personoj, kiuj parolas nur angle, ĉar la leĝoj ne devigas ilin integriĝi kaj lerni la nederlandan. Tio estas absurda situacio en kiu ekz. serboj kaj kartveloj ja devas fari tion kaj fine fariĝas bone integritaj nederlandanoj, dum la membroj de EU-restas ekster la socio kun nula kono de la lingvo kaj kulturo. Nederlandanoj devas lingve adaptiĝi al ili kaj uzi la anglan. Ofte mi ne povas mendi kafon en la lingvo de nia lando! Ni aldonu al tio ke pluraj universitatoj ofertas instruadon en la angla, foje la plimulton de sia programo, pri kio plendas ne nur nederlandaj studentoj sed ankaŭ la profesoroj. Tio ja altiras multajn eksterlandajn studentojn, kiuj tiam diplomiĝas en Nederlando, sed ofte ne povas trovi laboron tie pro malbona aŭ nula kono de la loka lingvo! Tiel do Nederlando diskriminacias sin mem!

Kaj, ni ne forgesu: en Nederlando situas la sidejo de nia lingvo, Esperanto. En kafejo kie mi venas regule mi povas uzi la lingvon praktike ĉiumatene!

Nu, ni preskaŭ nenion diris pri la nederlanda mem, kiu ja estas LA lingvo de praktike ĉiuj loĝantoj de Nederlando. Ĝi kunligas la diversajn etnajn grupojn kaj estas ne nur funkcia sed ankaŭ simbola ligilo de la etna kalejdoskopo nederlanda. Ankaŭ la aŭtoro de tiu ĉi konciza

prezento ne estas ĝia denaska parolanto, sed tamen konsideras la lingvon sia kaj al li kara. Tiu lingvo estas la kunliga fadeno de ĉiuj loĝantoj de Nederlando. La lingvo kunligas nederlandanojn kun iliaj flandraj kaj germanaj najbaroj, sed ankaŭ transmare kun surinamanoj, antilianoj kaj parto kun sudafrikanoj.

La *afrikansa*, rilatas al la nederlanda simile kiel Ido al Esperanto. Temas pri parte kreoligita sudhollanda dialekto kiu dum lastaj cent jaroj fiksiĝis kaj evoluis kiel aparta lingvo. Tiu lingvo parolatas ankaŭ en Namibio, interalie de aparta miksita etna grupo, t.n. *basterdoj*. Iam oni parolis la afrikansan en Zimbabvo kaj Bocuano, sed tiuj tempoj pasis. Pli kaj pli da afrikansparolantoj nuntempe ni trovas en Aŭstralio aŭ Kanado. La *afrikansa* en Sudafriko rapide malkreskas kaj malgraviĝas, malgrau siaj 5 milionoj da parolantoj. La nederlanda naskis ne nur la afrikansan sed plurajn aliajn kreolajn lingvojn, k.e. la tiel nomata *negra hollanda* (iam sur La Virgulinaj Insuloj) kaj la *Berbican Hollands*, kiuj nuntempe malaperis. La nuna Novjorko iam estis Nova Amsterdamo, Brooklyn estas nederlanda loko Breukelen, kaj Harlem estas Haarlem. En tempoj kiam hollandaj komercistoj interŝanĝis felojn kun indianoj estiĝis iaspeca hollanda piĝino por komuniki kun lokaj indianoj. Nu, la nederlanda ne estas nur lingvo, sed esence lingvaro, unu lingvo kun multaj vivoj. Interesa lingvo por interesa movado kiel la Esperanta. El la studo de vivo kaj vivformoj de la nederlanda, esperantistoj povas multon lerni. Tio estas plia kialo kial mi amas la lingvon de mia nova lando.

Nikola Rašić

kroata nederlandano aŭ nederlanda kroato

PLACO EN LA ITALA URBO MASSA HONORE AL GEFRATOJ DAZZINI



La 31an de majo en la itala urbo Massa okazis stratinaŭgura festo honore al konataj esperantistaj gefratoj Cattina kaj Mario Dazzini. Ekde nun placeto en la urbocentro de Massa portas ilian nomon kaj pravas la agnoskon pri ilia agado por Esperanto flanke de la aŭtoritatoj.

Inter esperantistaj instruistoj precipe Cattina estis konata, ŝi ne nur instruis Esperanton en lernejo de Massa, sed inter aliaj agadoj ankaŭ estris la lokan asocion, estis fakdelegito, prizorgis la pli ol 6000-pecan librokolekton, fonditan de ŝia frato kaj transdonitan al la Ŝtata Arkivo, kreis rilaton kun la politikaj estroj de San Marino kaj kontribuis en la fondo de Akademio de Sciencoj en San Marino. Pli detalan biografion vi povas legi en la prezento ĉe la Panteono de edukado.net.

Esperantistoj ekde la jaro 2000 trifoje turnis sin al la aŭtoritatoj kun la peto nomi straton aŭ placon honore al la gefratoj. La tria peticio portis sukceson kaj sekve la 31an de majo 2018 kelkdeko da italaj esperantistoj kune kun reprezentantoj de la loka lernejo Vallegra kaj aŭtoritatoj povis ĉeesti la feston.

Fontoj: artikolo de loka gazeto en Massa

SOMERA PROGRAMO 2018 EN GREZILJONO

- 9-a – 27-a de julio 2018: 2-a Maratona Esperanto-kurso dum 18 tagoj (7 + 5 + 6) kun Perla Mielo, Louis Jeuland, Nina Korĵenevskaja, Mikaelo Bronŝtejn
- 9-a – 16-a de julio 2018: 4-a [Interŝanĝoj](#) de sciokaj faroj kaj Esperanto-kurso
- 16-a – 22-a de julio 2018: [Semajno de ĉiĉeronado](#) en la regiono Anĵuo kun Catherine Kremer
- 16-a – 21-a de julio 2018: [Speciala semajno](#) kun kursoj de Esperanto
- 21-a – 27-a de julio 2018: 30-a [Internacia E-Konferenco](#) de OSIEK «Esperanto en Artoj»
- 11-a – 19-a de aŭgusto 2018: 8-a [Festa Semajno](#) por infanoj kaj familioj

Bert Schuman

LA 20-A INTERNACIA ESPERANTO-KONFERENCO "ALP-ADRIO" EN BJELOVAR (KROATIO)



En la bela kroatia urbo Bjelovar en la periodo de la 8-a ĝis la 10-a de junio 2018 okazis jubilea, la 20-a Internacia Esperanta Konferenco de "Alp-Adrio". Anton Miheliĉ prezentis en la unua parto de la konferenca temo "Alpoj-Adrio kaj Danubio" kun helpo de projekciataj diapozitivoj referaĵon sub la titolo: "Iniciato por komuna agado de Esperantistoj el la regiono Alpoj-Adrio-Danubio (AAD)". La raporton tre bone pritaksis multaj partoprenantoj. Miheliĉ montris kelkajn areojn, kie oni povus fortigi kunlaboron inter la esperantistoj en tiu regiono (integriĝo de la esperanta komunumo en plivasta koimerca kaj politika komunumo de la Alpoj-Adria regiono, edukado, kulturo, sporto, turismo kaj informado).

La detalojn de la prelego oni povas trovi sur la retpaĝo: http://www.antonmihelic.com/OBJAVE%20ZA%20JAVNOST/AA-KONFERENCA%202018/Miheliĉ,%20referat_20A-

[A_2018_oslak%20\(1\).pdf](#). Samteme prelegis ankaŭ Edvige Tantin Ackerman, sekretario de la Esperanto-Rondo de Alp-Adrio, el Italio, Janez Jug, prezidanto de Slovenia esperanto-Ligo (SIEL), prezentis la artikolon pri la temo "Pasintaj atingoj, nunaj cirkonstancoj kaj estontaj

eblecoj". La referaĵon devis prezenti Janez Zadavec, la pasinta prezidanto de SIEL, sed pro personaj kialoj li ne povis ĉeesti la konferencon. La bazo de ĉi tiu tema parto estis disvastigo de la esperanta agado en la regiono de Alp-Adrio sed ankaŭ de Danubio.

En la dua konferenca temo "Publikaj rilatoj de esperantistoj kun neesperantistitaj medioj" prezentiĝis tri referaĵoj: "Rilatoj kun neesperantistitaj medioj – bjelovaraj spertoj" de la diligenta kaj sukcesa esperantisto Josip Pleadin el Kroatio, "Esperanto - ret radio" de la esperantisto el Aŭstrio, Anton Oberndorfer kaj "La kontaktoj de religio kun la arto" de la esperantistino el Hungario, Marie Eszes.



Post ambaŭ temoj evoluis vigla debato, kiu prezentis multajn bonajn solvojn. Dum la Asembleo de Esperanto-Rondo de Alp-Adrio la debato montris aliajn eblajn temojn por la estontaj konferencoj. Recivitaj estis multaj proponoj, sed la fina decido akceptiĝos en postaj kunsidoj de la Sekretariejo de la Konferenco "Alp-Adria" kaj potenciala organizanto de la 21-a Konferenco venontjare.



estas la 19-a Konferenco, pasintjare, en Brežice.

Inter la oficialaj partoj de la konferenco aperis la juna gitaristo de Muzika lernejo Bjelovar, Marta Ĉuković, instruita de prof. Siniša Paruska. La partoprenantoj povis vidi bonege preparitan retrospektan ekspozicion en la Urba Muzeo, kun lokoj kie okazis ĉiuj 20 konferencoj, de la unua en 1989, en Arnoldstein (Aŭstrio) ĝis la ĉijara, en Bjelovar, inter ili ankaŭ



komuna fotado por la memoro al la agrabla jubilea internacia renkontiĝo de esperantistoj.

En la parko, ĉe Trg Stjepana Radića, la partoprenantoj ĉeestis la plantadon de la "Arbo de internacia amikeco" kiu rememorigos pasantojn en la estonteco pri ĉi tiu grava jubilea historia evento en la movado por Esperanto.

Ĉe la Pavilono en la ĉefa urba parko okazis

En Hotelo Central, la esperantistoj kunvenis je la komuna vespermanĝo kaj poste okazis la



20-a Alp-Adria Esperanto-Konferenco
Bjelovar, 8-a – 10-a de junio 2018

kultur-amuza programo kun elstara tenoro de la Opero de Kroata Nacia Teatro en Zagrebo, Neven Mrzlečki kaj koruso Fonix de Komlo (Hungario). Ankaŭ estis organizita ekskurso al Daruvar kun ĉiuj tieaj specialaj trajtoj.

El Slovenio ĉeestis Janez Jug, Milan Škrlj, Davorin Jurač, Anton kaj Reneja Mihelič. La konferenco estis denova amika kunveno de la esperantistoj, kun multaj man-premoj, interesanĝitaj spertoj, memoroj. Grandan laŭdon meritas escepte gastama organiza teamo.

Anton Mihelič

NOVAĴOJ DE ASOCIO DE VERDULOJ ESPERANTISTOJ

AVE ĉe Konsilio de Eŭropaj Verdaj Partioj (la 19an de majo 2018)

Triopo de AVE partoprenis la ideo-foiron je sabato kaj montris la potencialon de Esperanto. Georgo Sossois raportis: Mi alvenis jam vendredon, povis negoci por senpaga eniro kaj por meti la materialon al la akceptejo, kaj sukcesis pri granda redukto de 180 al 60 eŭroj. Tiel ni povis aranĝi la salonan budon sufiĉe frue. Ĉar ni havis multe da materialo mi sukcesis ricevi plian tablon. Do, ni triope, ekde la komenco organizis nin por ke ĉiam estu iu por ricevi vizitantojn - bone funkciis. Fotisto de Greens prenis foton pri la budo. Persone mi parolis pri E-o kun mia eŭropa deputito (Lamberts) kaj al kelkaj gejunuloj de Groen ĉe la akceptejo. Ankaŭ kun la espereble estonta urbestro de Antverpeno Wouter van Bezien. Sed ne estis tiom da homoj kiom en Parizo. Koran dankon al Georgo, Ronaldo, Piet kaj Gerd kun la esperantistoj el Antverpeno, kiuj pruntedonis al ni bone elektitan gamon da materialoj.

Eŭropaj Verdaj Partioj prezentas sian ĉarton en Esperanto kaj 24 aliaj eŭropaj lingvoj: La listo de la tradukoj estas tute sube, Esperanto #1! <https://europeangreens.eu/node/5745>
Bedaurinde la aktualaj Manifestoj okaze de elektoj por la EP tie nur troviĝas en la angla; tradukon en Esperanton vi trovos sur nia retejo (1-a paĝo): verduloj.org.

LA KVARA PARTO EL LA LIBRO »IDENTECOJ« IV. GRUPIDENTECO KAJ SIMBOLOJ

Mi ripetas, homo kiel socia estaĵo (grupestajaĵo) havas genetike enkonstruitan bezonon pri kunvivado kun aliaj kaj rilate al tiu bezono li reagis per emocioj kaj raciaj pripensoj sed la realigo de tiuj reagoj dependas de eksteraj faktoroj, de faktoroj el la ĉirkaŭaĵo. Se infano naskiĝas en islama vilaĝo ne estas eble ke ĝi estu kristano denaske. Se etan infanon oni forportas el la naskiĝĉirkaŭaĵo for en alian ĉirkaŭaĵon (ni diru ke la infano naskiĝis en Slovenio de slovenaj gepatroj) kaj baldaŭ post la naskiĝo la tuta familio translokiĝas al Usono, la infano fariĝos baldaŭ Usonano eĉ se la gepatroj tre klopodos eduki ĝin en la slovena lingvo kaj por la slovenaj valoroj. La infana ĉirkaŭaĵo kaj ĉiuj aliaj faktoroj (publikaj medioj, infanĝardeno, najbaroj...) estas multe pli fortaj edukfaktoroj kaj la infano nepre volas fariĝi tia, kia estas la absoluta plimulto en lia ĉirkaŭaĵo. Iom da slovena identeco ĝi konservas, se la gepatroj sukcesos daŭre evoluigi la slovenan lingvon kaj almenaŭ de tempo al tempo iri kun la infano al Slovenio. Sed se ili cedos al la premoj de la ĉirkaŭaĵo, ĉar oni devas uzi multan tempon por la duobla eduko de la infano kaj uzi multan monon por relative ofte viziti la eksan patrujon, la batalo estos certe perdita. La infano perdos ĉiujn sentojn por la iama patrujo. Sed io restos ankaŭ poste kiam ĝi plenkreskos, kiam ĝi ekkonscios ke ĝi havas radikojn ie aliloke, tiam ĝi eble mem investos iom da penoj por rehavi ankaŭ tiun patrujon. Sed estas logike ke ĝi havu ambaŭ identecojn. La sentoj de la aparteno estas kiel la amo. Oni amas homojn de sia grupo, ilian kulturon, vivmanieron, valorojn. Sed oni povas travivi seniluziigon kaj la amo malaperos.

Mi mem estis edukita interalie ankaŭ por la jugoslavia identeco en lernejoj kaj por la kroata identeco en la Zagreba ĉirkaŭaĵo. Kiam malaperis Jugoslavio (ĝi simple ne plu ekzistis en Zagrebo), ankoraŭ iom da tempo daŭris tiu amo (jugonostalgio), sed iom post iom ĝi malaperis. Sed min seniluziigis ankaŭ la kroata identeco, kiam tiu kroata postulis de mi eĉ mian vivon kaj la landon komencis gvidi homoj kiuj proklamis malhumanajn principojn de ŝovinismo kaj malamo al aliaj popoloj kaj kiujn mi pro tio malamamis. Pro iliaj novaj »valoroj« (ekstrema naciismo, ekstrema religia dogmatismo...) mi decidis forlasi Kroation. (Jugoslavio ĉiukaze jam forlasis min) kaj mi translokiĝis al Slovenio. Ĉi tie la politika retoriko estis tute alia (la slovenoj nur en la komenco de la nova ŝtato, dum kelkaj monatoj estis relative naciismaj, sed post nur kelkaj monatoj, kiam ili vidis ke de naciismo ne portas iun utilon ili sobriĝis. Religia ekstremismo ĉi tie estis neniam forta. Ĉi tie plaĉis al mi kaj mi tuj komencis lerni la slovenan lingvon, mi aŭskultis la radion kaj televidon, interparolis kun slovenoj, legis gazeton kaj librojn. Baldaŭ mi ekamis Slovenion, kiu donis al mi la eblecon vivi kaj ekzisti ene de por mi multe pli akcepteblaj valoroj. En la koro mi iĝis sloveno. Tio ne signifas ke mi ĉesis esti kroato. En Kroatio mi vivis 45 jarojn kaj tie estas ankoraŭ mia familio, multaj amikoj kaj multaj gravaj aferoj por mi. Sed mia kroateco iom malfortiĝis, dum la sloveneco kreskis.

Pro kio ni efektive havas la identecojn? La homo ĉiam vivis en grupoj kaj tiamaniere evoluigis vivstrategiojn lige al la ĉirkaŭaĵo, klimato, kondiĉoj ktp. Sed la diversaj grupoj ne ekzistas nur pro la akomodigo al la ĉirkaŭaj vivkondiĉoj, sed ankaŭ pro la engrupa socia dinamiko. Kion tio signifas? Ĉiu grupo defendas sin mem kontraŭ malamikaj grupoj, kiuj ĝin atakas aŭ mem atakas aliajn, kiam ĝi estas forta kaj potenca. Do, ĉiu grupo estas unuflanke danĝera por aliaj grupoj kaj samtempe ĝi ofertas ŝirmon al la propraj membroj pro eventuala atako far aliaj grupoj. Pro tio la grupanoj interalie devas kiel eble plej bone rekoni al kiu grupo iu unuopulo apartenas. Ĉu al la mia (amika) aŭ al fremda (kiu aŭ estas danĝera aŭ

potenciale danĝera). Sekve la ĉefa kaŭzo por ekzisto de identecoj estas nepreco povi diferencigi la miajn de la fremdaj, do la rekono de anoj de aliaj grupoj.

Kiel ni rekonas al kiu grupo iu apartenas? Laŭ simboloj kiuj nin ĉiujn markas. Laŭ identaj signoj kiujn montras apartenantoj de unusama grupo. Tial ni parolas pri identecoj. Kio do estas identa al ĉiuj kroatoj ekzemple, laŭ kio eblas scii ke iu estas kroato? Kaj kiuj estas identaj signoj kiujn montras slovenoj kaj kiujn ĉiuj neslovenoj povas rekoni?

Temas pri signaloj kiujn ni elsendas senkonscie kaj konscie. La ĉefa kaj baza signo de gruprekono estas lingvo. Se ne eblas rekoni pro rasa haŭta diferenco (ekz. en Eŭropo granda plimulto estas blankuloj) tiam la grupan apartenon unuopulo montras per parolata lingvo. Estas aro da aliaj kromsignoj kiuj ne nepre estas konstante ĉeestaj, sed rilatas al grupkulturo (muziko, sporto...), konduto ktp. Se iu fremdulo lernis la slovenan lingvon, estos pli malfacile rekoni lin, sed tamen tre malofte fremdulo sukcesas tiel bone lerni la lingvon ke oni tute ne povus rekoni lin kiel fremdulon. Se ni estas lingve pli edukitaj ni facile pro lingvaj eraroj de la parolanto konkludas de kie li venas. Se la ulo tamen bonege konas la slovenan tiel ke ne eblas rekoni lin laŭ tio, ni povas demandi lin pri lokaj sportaj okazaĵoj pri kiuj ĉiuj slovenoj estas bone informitaj aŭ ion pri Prešern aŭ ion pri slovena historio aŭ geografio kaj baldaŭ ni komprenos ke temas pri homo needukita en Slovenio, homo kiu ne vivis denaske en Slovenio. Kaze de pli granda danĝero por grupo la sento de aparteno fortiĝas kaj povas kreski ĝis fanatismo. En tiaj situacioj la apartenantoj de grupoj kun granda fiero portas videblajn signojn de la aparteno. Tion ni vidas ĉe la sportaj eventoj, kiam ankaŭ la publiko surhavas ĉemizojn kun simboloj de sia popolo aŭ urbo aŭ urba klubo. Oni vidas tion ankaŭ en militoj, kiam unu flanko surhavas unuspecan uniformon kaj alia alian, kiam unuj portas unuspecajn flagojn kaj aliaj alispecajn. Kiam ekzistas bezono por pli forte evoluigi grupidentecon, oni uzas ankaŭ simbolojn de identeco: blazonojn, himnojn, flagojn, diversajn insignojn ktp. Ĉar la homo estas genetike tiel strukturita, ke li estas potenciala batalanto cele al defendo de la propra grupo aŭ por venki kaj subjugi fremdajn grupojn kaj grupanojn, li havas la bezonon de tempo al tempo efektiviĝi sian batalemon kaj agresemon, aparte la viroj. Se en iu lando longe ne okazis militoj, la homoj sentas la bezonon almenaŭ artefarite organizi kvazaŭmilitojn. Tion plej simple oni faras per sportoj, plej efike per kolektivaj sportoj. Kiam la niaj ludas kontraŭ fremdaj futbalistoj, tio tre similas al milito. Nia dekunuopo estas la soldatoj, dresitaj por la batalo kaj troviĝantaj surfronte, kaj ni ĉiuj aliaj estas ilia popolo kiu vivas por ili kaj ĉiumaniere subtenas ilin, samkiel dum la milito la tuta popolo produktas por la milito kaj soldatoj, subtenas ilin de sur tribunoj kaj timas ĉu ili sukcesos aŭ ne. Se la skipo de la malamiko estas forta, eble pli bona ol la nia, antaŭ la batalo (matĉo) ni tre timas pro granda verŝajneco ke la niaj (do ni) perdos la batalon. Sed kiam niaj sukcese trafas la golon (komencas venki) la timo rapide ŝanĝiĝas al faciliĝo kaj en tiu stato ni sentas grandan feliĉon, oni povas diri spiritan orgasmon. Kaj tiu sento, kiun havas ankaŭ soldato, kiam post granda timo lia grupo kemencas venki – do travivas plej eble grandan feliĉon. La sento estas tiom fortega, ke ĉiu deziras travivi ĝin laŭeble plej ofte. Estas ja ĝenerale tiel: La plej fortajn belajn (pozitivajn) sentojn ni travivas nur post la plej teruraj (negativaj) sentoj. Tial ni iras al sportaj matĉoj, tial ni transdonas nin al danĝeraj situacioj (por provoki adrenalinon) kiu ebligas ke la posta venko elvokas sentojn de apenaŭ priskribebla feliĉo.

Tial estas eble ke gvidantoj de grupoj aŭ ŝtatoj kun la helpo de propagando kreu artefarite danĝeron por la propra grupo, ke la popolanoj perdu la racion kaj fanatike eniras en kolizion kun tiuj kiuj laŭ ilia konvinko endanĝerigas la grupon (ŝtaton, nacion). Tiusence helpas ekstrema ideologio kaj aliaj rimedoj kiuj havas simbolan signifon.

Zlatko Tišljarić

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 3-an de junio 2018

Redaktoro: Zlatko Tišljär

En la numero kunlaboris: Nikola Rašić, Manfred Westermayer, Bert Schuman, Anton Mihelič, Zlatko Tišljär

Kontakto: ztisljär (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

